4-a Jaro. N-o 192 APERAS  SEMAJNE 7. Junio 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

FAŜISMO KAJ VATIKANO

Depost sia potenc-konkiro la faŝismo ne ĉesas teni la plej bonajn rilatojn al la Eklezio kaj la Sankta Seĝo. La registaro de Musolini rekonis la katolikismon kiel ŝtatan kulton. Ĝi respektis la romanajn tradiciojn kaj defendis la simbolojn de la religio. La nomo de dio denove estas aplikata en la oficialaj ceremonioj. La portreto de Kristo pendas en la tribunaloj kaj lernejoj, kaj la kruco estas restarigita en la Koloseo kaj sur la Kapitolo. La religia instruado fariĝis deviga en la elementa lernejo. La pastraro estas liberigita je pli pezaj militistaj devoj. Fine kelkaj religiaj festoj estas transformitaj en naciajn festojn, por kiuj la laborinterrompo estas leĝe fiksita. Aliparte, ĉiuokaze, la membroj kaj reprezentantoj de la registaro multobligis la pruvojn de respekta cedemo antaŭ la religiaj aŭtoritatoj. Interalie la "duce" donacis al la vatikana biblioteko la riĉan kolekton da libroj, manuskriptoj kaj dokumentoj de l' palaco Chigi. Siaflanke la Eklezio kaj la Sankta Seĝo ne restis malsentemaj je tiom da komplezemo. Ripete, la kardinaloj komplimentis la meritojn de l' ĉefo de la registaro. La papo mem deklaris, post la atenco de Bolonjo, ke la tuta Italio ektremis pro indignego kaj abomeno ĉe la freneza atenco, preparita kontraŭ "la homon, kiu tenas kun rimarkindaj forto de animo kaj kuraĝo la bridojn de la ŝtato". En tiu ĉi momento cetere la reciprokaj indulgoj ŝajnis plej naturaj. Faŝismo kaj katolikismo kredis povi samsenti en la sama spirito de konkordo kaj frateco. Ĉu ili ne estis movataj ambaŭ de la samaj sentoj pri ordo kaj hierarkio? Ĉu la du potencoj ne estis bazitaj sur la samaj principoj de absoluta disciplino kaj aŭtoritato?

Tia estis la roma atmosfero de 1920 ĝis 1926. Cetere, en tiu tuta periodo la faŝismo ankoraŭ ne precizigis sian doktrinon. Dume, iom post iom la konceptoj, la spiritostato, la filozofio de l' nova reĝimo videbliĝas. En ĉiu plua tago la riskema politiko preciziĝas, kaj sur la disrompaĵoj de l' malnovaj ideoj de l' liberalismo stariĝas politika aŭtoritatismo unu el la plej absolutaj. Samtempe, en tuta Italio, la plej arda naciismo penetras la moralajn kaj sociajn valorojn. La imperialista ideo aperas. La faŝista ŝtato konstruiĝas.

La proleta klaso ne povas senpasie, sen kolera indignego paroli pri tiu reĝimo de teroro, ĉar jam tro multajn viktimojn ĝi oferis, kiujn dronigis en sango la faŝistaj ekzekutistoj. Kaj pliaj vivoj aktuale estas minacataj . . .

Aliel rilatas al tiu reĝimo la Eklezio kun sia potenca aparato. Oni ne devas forgesi la persistan celadon de la roma eklezio, ne nur regi la spiritojn de la homoj per sia dogmo, sed ankaŭ akiri materian potencon. Ni memorigas pri la klopodoj de la paparo dum la mezepoko, krei tutmondan regnon teokratian, en kiu ili estus tutpovaj regnestroj. Ili fiaskis. La princoj restis venkantoj. Sed la papoj neniam rezignis je sia celado al absoluta superregado ne nur spirita, sed ankaŭ materia. Aliflanke la papoj devas atenti la katolikan "ŝafidaron", siajn regatojn. Tiuj lastaj prezentas amason tutmondan; ne estas superpezo en Italio. Sekve la Sankta Seĝo vole-nevole devas iel proprigi al si supernacian vidpunkton, dum la faŝismo mem estas esence nacieca. Fakte la Eklezio en sia italia parto estas trafita de la faŝist-idea marĉo: se ne la duagrada klerikularo tenas sin en rezervo, la episkoparo italia preskaŭ unuanime manifestas plej klare siajn aprobajn sentojn al la faŝismo. — De tiam ĝi serioze konsideras la danĝeron esti influata, kiom ajn malmulte, de la faŝismo. Fidela al sia opinio kaj sia doktrino, kiuj ĝin malhelpas submetiĝi al iu ajn ŝtato aŭ politika partio, ĝi volas montri, ke nenio pravigas kredi, ke ĝi aprobas senrezerve la faŝistan reĝimon. De tiu momento, la lerteco de Musolini puŝiĝas je la intenco de la Sankta Seĝo nepre malhelpi antaŭ la mondo eĉ la plej malgrandan konfuziĝon. La Vatikano ne timas de tiu momento rimarkigi nombron da konfliktoj inter la doktrinoj aŭ metodoj faŝistaj kaj katolikaj. La musoliniaj reformoj iris sub la pligrandigan vitron. Post publikigo de la Laborĉarto[1]) la papa organo rapidis rimarkigi, ke tiu ĉi novigaĵo ne akordiĝas "kun la kristana koncepto pri la ŝtato kaj la individua libereco". La faŝista iniciato publikigi grandan nacian eldonon de la verkaro de d' Anunzio estas publike mallaŭdita de Pio XI-a. Lastdata polemiko permesas konstati, kiom riĉa je opozicioj kaj konfliktoj estas la problemo de l' rilatoj inter la katolika Eklezio kaj la faŝista ŝtato.

Unu el la ĉefaj teoriistoj faŝistaj

---

[1]) Konstitucia dokumento pri laborreguligo, kiu estas tradukita esperanten kaj estas disvastigata (parte senpage) en UEA-rondoj.

Gentile, instruministro, ne sen disreviĝo, plendas pri la fakto, ke la reprezentantoj de la religio ne kontentiĝas, en la lernejo, pri la cedoj de l' ŝtato. Timante, ke la katekismo, mortigis en Italio la pensliberecon, li subtenis kontraŭ la Eklezio kaj nome de la faŝismo la tezon pri racionalismo kaj filozofi-scienca liberalismo.

La papa organo kontraŭ tiu ĉi atako ne respondis malpli fajre, memorigante unue, ke la ŝtato mem volis, ke la lernejo ne estu senreligia, sed katolika. Kaj tiel ĝi rezonas: "La lernejo ne nur estas elementa, ĝi estas meza, ĝi estas supera kaj konsekvence devas esti religia de komenco ĝis fino. Oni ne povas interrompi la studadon en momento, kiam la junuloj eniras la vivon. Oni ne povas akcepti pendolan edukadon, balanciĝantan inter la religio kaj la neado, inter la rivelita (malkaŝita) vero kaj la kritiko, inter la opinio per la fido subtenata aŭ renversata per la senbrideco, inter la certeco kaj la dubo, inter la ordo kaj la anarkio . . ."

Tiel same rezonadis la papo en la nova konflikto pri la edukado. Li kritikis la faŝistan ŝtaton, ĉar ĝi praktikas "veran monopolon sur la edukado de l' junularo, ne nur fizikan, sed moralan kaj spiritan". Efektive la faŝista ŝtato konsideras la edukadon kiel esencan ŝtat-funkcion kaj kiel garantion de daŭrado por si mem. Per la "legioj", gimnastiko, lernejo kaj sporto ĝi volas forĝi la pensmanieron kaj la korpon de l' infano rigarde al la superaj bezonoj de la patrio. La infano apartenas antaŭ ĉio al la ŝtato. — Al tiu tezo de Musolini respondis la papo, ke li por la Eklezio tute ne postulas monopolon de l' edukado, sed simple la kristanan formadon de la junularo. Temus do resume harmoniigi en kohera tuto la du edukajn funkciojn de l' Eklezio kaj de l' ŝtato. Sed ĝuste tie kuŝas la granda malfacilaĵo. Ĉar kiu diras "morala edukado", kiel ĝin depostulas la reĝimo, diras necese "edukado de l' tuta animo".

Funde, la konflikto turniĝas ĉirkaŭ la fenomeno de l' naciismo. La tutmonda tendenco katolikara estas tre klare kontraŭfaŝisma. Sed ĉar la papo kaj granda parto de la administrantaro de l' Sankta Seĝo estas mem italoj, ili estas tre singardemaj, ĉar kondamni en Italio la naciistan doktrinon, signifus ne nur konfuzi kelkajn konsciencojn, sed dividi la nacion . . .

En tiu konflikto la proleta klaso nature nur ludas tre pasivan rolon. Ambaŭ doktrinoj, la religia kiel la faŝista, estas same reakciaj kaj same kontraŭbatalindaj. Sed ni certe ne povas kaŝi nian ĝojon, rimarkante, ke en lando, kie momente la Proletaro estas kondamnita al absoluta pasiveco, du potencoj intermalpaciĝas pro la potenckonkiro. La ambaŭparta fortokonsumo pligrandigos nepre la ŝancojn de l' Proletaro pri estonta renverso de l' reganta reĝimo en Italio.



Ribelulo amita de la laboristoj

Vilhelmo D. Haywood (Hevud) mortis en Moskvo la 18-an de majo. Li longtempe restis en la Kremla Hospitalo, suferante je arteria sklerozo[1]). Oni atendas lian enteriĝon sur la Ruĝa Placo apud la tombo de Lenin.



Miloj da laboristoj funebros la morton de la fama amerika revoluciulo. Haywood estis amerikano el la okcidento kaj travivis kiel metal-ministo la malkvietegajn tagojn de la grandaj strikoj en Kolorado, Idaho kaj aliaj lokoj. Li komencis labori en la minejoj, kiam li estis naŭjara. Li fondis kaj gvidis la Western Federation of Miners (Okcidenta Federacio de Ministoj), la organizon de kupro-, oro- kaj aliaj metal-ministoj. Sub la gvidado de Haywood tiu ĉi organizo famiĝis pro la riskema batalspirito de siaj anoj, el kiuj multaj estis "hobo"-(vagist-)ministoj, "flosantoj", kiuj vagis de loko al loko, laborante en tiu ĉi danĝera metio.

Kune kun Moyer kaj Pettibone, Haywood devis travivi juĝan ekzamenon pro mortigo — tipa amerika "frame up" (trompa afero), sed estis trovata senkulpa. Pettibone mortis baldaŭ poste, kaj Moyer nuntempe estas malamata reakciulo.

Haywood — "Granda Vilĉjo", kiel li ame estis nomata inter centmiloj da usonaj laboristoj — frue aliĝis la Socialistan partion de Usono kaj estis dum multaj jaroj plenum-komitatano. Li forlasis la partion post la dekstraflanka venko, kiam la fama Sesa Regulo, kiu permesis rektan agadon ("direct action") estis forstrekata el la partia konstitucio. Sed Haywood plej bone estas konata pro sia laboro en la I. W. W. (Industriaj Laboristoj de la Mondo)-movado, kiun li helpis starigi kaj kies sekretario li estis dum multaj jaroj. Li gvidis kun aliaj IWW-estroj la famajn strikojn de Laŭrence, Petersen, Mc Kees Rocks, Mesaba Range kaj aliajn.

En 1918 li ricevis, kune kun naŭdek sep aliaj, malliberigan punon da dudek jaroj pro "ribelo". Post du jaroj li estis liberigata, dum oni procesis lian apelacion. Perdinte la apelaci-proceson, li forkuris al Sovetio, kie li loĝis depost tiu tempo kiel politika rifuĝinto . . .

Li estis unu el la plej bonaj oratoroj de la tutmonda laborista klaso. Pli ol du metrojn alta, kun grandegaj ŝultroj, li estis okulfrapa viro, starante sur estrado. Li parolis per plenaj, sonantaj tonoj, simple kaj sincere, kelkfoje atingante verajn altaĵojn de nestudita, pasia elokventeco. Escepte Debs, neniu en Usono povis teni aŭskultantaron kiel "Granda Vilĉjo".

Tradukis el "Sunday Worker" (Dimanĉa Laboristo) 8048.

[1]) Malmoliĝo de la histoj.



Faktoj kaj komentoj

Unueco!

Estas konate, ke socialdemokratoj kaj komunistoj vivas en malpaco. Sed ke ili eĉ uzas la pafilojn kiel argumentojn, estas plej bedaŭrinda fakto. Tio okazis la 1-an de majo en Polio. Kaj tio okazis antaŭ la balotoj en Hamburgo. Komunistoj moviĝis sur ŝarĝaŭtomobiloj tra la stratoj, por varbi por siaj kandidatoj. Proksimume 20 socialdemokratoj, revenintaj de propaganda manifestacio, ripozis en gastejo, kiun preterveturis la komunistoj. Komenciĝis la kutima insultado, kaj subite ekkrakis la pafoj. La komunistoj havis kvin vunditojn, unu socialdemokrato estis mortpafata. Nun ĉiu partio asertas, ke la alia pafis unue.

"Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!" estas nia devizo. Sed malproksimaj ni estas de la celo! Tiu okazintaĵo denove montris tion. Kia ĝojo por la kapitalistoj, ke la laboristoj inter si mem uzas la pafilojn! Laboristoj, kiuj havas sufiĉe da kaŭzoj, por malbeni la militon, mem pafis al siaj propraj klasfratoj. — Proletoj, K-doj, nur kune batalante ni povos venki la komunan malamikon!

(2105)



La venengaso en Hamburgo

En iu kemia fabriko de Hamburgo tri kaldronoj plenaj je fosgenfluidaĵo eksplodis kaj kovris en densa gasa nubo alian urboparton loĝatan de laboristoj, semante morton kaj malsanon. 14 personoj mortis kaj 200 estis transportataj en la hospitalojn.

Tiu okazo nur donas palan bildon pri la vera efiko de la kemio en venonta milito. La intensa produktado de venengasoj montras, kiom hipokritaj estas la belparoloj pri paco interpopolara.

HODIAŬAJ ĈININOJ

Antaŭ 20 jaroj en imperiestra Ĉinio aperis leĝo pri enkonduko de virina klerigado. Ĝi estis la unua lumradio en la netravidebla mallumo, kiu ĉirkaŭis la ĉinian virinon. En la sankta konfuciana libro Li-czi estas dirite: "La virino devas ĉiam esti regata de la viro. Dum la infanaĝo ŝi obeas la patron kaj la fratojn, depost la edziniĝo — la edzon, kaj vidviniĝinte — la plej aĝan filon." Tiel la religio fiksis la sklavigon de la ĉinino.

Multe da tempo pasis depost tio. La ĉinia virino havis multajn venkojn. Ŝi ĉesis esti obeema sklavino, ŝi akiris por si la rajton, egale kiel la viro, kleriĝadi, okupi sin per memstara laboro, memstare elekti al si la edzon, partopreni la politikan kaj socian vivon.

Hodiaŭ en Ĉinio ĉe lernotabloj sidas proksimume duonmiliono da junulinoj. Oni konas jam multe da virinoj kiel juristojn, kuracistojn, inĝenierojn. Jam ekzistas ĵurnalistinoj, bank- kaj kontor-oficistinoj kaj eĉ aviadistino (f-ino Ĉu el Kantono). La ĉinino forĵetas de siaj ŝultroj la restaĵojn da malkuraĝo kaj timemo, kulturitajn de jarcentoj da sklaveco. Nun ŝi estas decidema, kuraĝa kaj energia.

En la grandaj industri- kaj havenurboj Ŝanĥajo, Tiansin, Uĥan, Kantono oni preskaŭ ne plu vidas la malnovmodan nacian virinkostumon. Nur iafoje preterpasas maljunulinoj en bluaj pantalonoj, balanciĝante pro kripligaj, etaj, lignoŝuoj. La ĉinia urba burĝa virino aspektas kiel iu tipa "miss" (fraŭlino) el avenuo de Nov-Jorko aŭ Ĉikago. Kompreneble ŝi ŝatas sporton, energie skuas la tonditajn harojn kaj portas mallongan jupon.

Sed tiaj virinoj ĉesis esti la kerno de la vera ĉinia virinmovado. La burĝaj ĉiniaj feministinoj atingis kontentigon de siaj postuloj, ili transformiĝis en lojalan opoziciularon, simile kiel en la okcidentaj landoj. Sufiĉas pasigi unu horon ĉe tagmanĝo en ajna hotelo de Pekino aŭ de "Ŝanĥaja" kolonio, por eksenti tion. La emancipitaj ĉininoj kun la junuloj elmontras dum la interrompoj inter la manĝoj neordinarajn kapablojn por elturnadi la kalkanojn kaj la genuojn. La modernaj dancoj iĝis por ili kultur- kaj progres-mezuriloj. Ili elviciĝis el la luktado.

Sed ni ekrigardu ien en vilaĝeton, kuŝantan 100 kilometrojn de Ŝanĥajo aŭ Kantono. La homoj kiel formikoj svarmas en malvasta multhoma vilaĝo. Ili laboregas por plenmano da rizo por la familio de sunleviĝo ĝis sunsubiro. Ĉi tien ne penetris la civilizacio. Kaj se eĉ ekzistas lernejo, en ĝi sidas malnova "Lao-fu-cza" — klasika lernejinstruisto kun bambua bastono, inspiranta al la geknaboj terurojn kaj estimon. Li malgaje kaj tedite encerbigas al ili komplikajn kaj ne tute kompreneblajn sentencojn de la antikvaj saĝuloj. La knabinoj ĉi tie forestas. La vilaĝana knabino ĝis nun ne jam konkiris al si la rajton kleriĝi. Kiel antaŭe, la gepatroj edzinigos ŝin sen ŝia konsento, fianĉinigas ŝin preskaŭ dum la frua infanaĝo. La edzo tenas ŝin kaŝita, kaj se li posedas monrimedojn, li prenas ankoraŭ konkubinon[1]).

En la urboj la situacio ne plibonstatas. Oni nur bezonas unu horon forlasi la asfaltajn trotuarojn kaj brileg-antajn magazenajn montrofenestrojn de la centrurbaj stratoj. Necesas trapaŝi malpuran mallumon de apudurbaĵoj, viziti kabanetojn similajn al tomboj, por ekvidi kaj kompreni, kiel vivas la virino de ĉinia malriĉularo. La emancipo ne ekzistas por ŝi. La laboranta ĉinino vivaĉas en aĉaj loĝejoj, en malpuro, malsato kaj mizero. Kion signifas por ŝi la fruktoj de la civilizacio? Antaŭ ĉio ŝi estas malsata kaj ĉifonvestita!

Sed tiuj ĉi amasoj jam antaŭenmovis sian avangardon, kiu konsistas el laboristinoj de fabrikoj kaj laborejoj. Kaj ili jam okupis honoran lokon en la historio de la ĉinia revolucio. Dum la bataltagoj en somero 1925 en Ŝanĥajo tri junaj studentinoj mortfalis kiel unuaj viktimoj. Kiu vidis dum tiuj tagoj la vizaĝojn kaj okulojn de la malsatsuferantaj laboristinoj, kiuj paŝis rekte kontraŭ la anglaj maŝinpafiloj, tiu scias, ke la estonto apartenas al ili. El malhelaj truoj, el polvoplenaj metiejoj la ĉiniaj laboristinoj iel sukcesadas trafi la lernejojn. Post la peniga tuttaga laboro kontraŭ 25 cendoj tage, manĝinte plenmanon da rizo kun akvo, la juna ĉinia knabino diligente sidas la tutan vesperon en vesperlernejo. Ŝi lernas avide, konsciante, kiom valoras la scioj por ŝia liberiĝo. Ŝi komprenis nun, ke plena liberiĝo de la laboranta virino estas ebla nur tiam, kiam ŝiaj kunfratoj-laboruloj prenos la regpovon kaj tial ŝi volonte eniras la vicojn de la klasbatalaj proletaj organizoj.

Men-lin. Trad. laŭ "Pacifik-Oceana Stelo", Ĥabarovsk, V. Baĵenov (1367).

[1]) kromvirinon.

SUB RUĜAJ STANDARDOJ

Impresoj kaj travivaĵoj en Sovetio

de

Einar Adamson (Göteborg)

Prezo inkluzive afranko: **0,75** mk. g.

Aĉetebla ĉe la Adm. de SAT en Leipzig

TAGO EL MIA VIVO

Malofte oni legas "Tagon" de edziniĝinta esperantistino; tial mi ankaŭ volas priskribi mian "tagon". Mi estas edzino, mia profesio estas oficistino, sed momente mi estas senlabora. Nia familio konsistas el la edzo, 34-jara, la fileto 3-jara, la patro 74-jara kaj la patrino 55-jara. Mi ellitiĝas je la sepa matene kaj preparas la matenmanĝon por mia edzo. Poste mi ordigas nian loĝejon, kiu konsistas el kvar ĉambroj, kaj la patrino samtempe preparas la tagmanĝon. Ĝis tiu horo la tempo pasas tiele: mi iras aŭ al la sindikatejo de PTT-laboruloj (poŝto-telegrafo), kies membro mi estas, por praktiki skribmaŝinon, aŭ mi promenadas kun mia fileto, aŭ mi restas hejme kaj kudras por la familio.

Ĉiumerkrede mi vizitas la esperantistan klubon. Tie mi gvidas rondeton por komencantoj. En la klubo mi parolas, legas ĵurnalojn kaj propagandas esperanton inter la klubanoj. Tiu ĉi klubo estas nomata "Centra laborista klubo", kaj ĝi unuigas kvar unuiĝojn, tiujn de la konstrulaboristoj, presistoj, ledistoj kaj nutraĵ-laboristoj. Ĉiumarde mi vizitas lernejon de politika ABC-o, kaj unu fojon monate mi ĉeestas kunsidon de virinoj, ĉar mi estas delegita de virinoj de poŝto-telegrafo kaj devas raporti al ili pri tiuj ĉi kunsidoj. Jam je la naŭa vespere mi revenas. Mi trinkas teon kaj unue legas lokan ĵurnalon kaj poste esperantajn ĵurnalojn kaj gazetojn. Interesajn gazetojn mi legas laŭtvoĉe por miaj familianoj: ili tre interesiĝas pri la eksterlanda vivo. Se mi ne havas novajn ĵurnalojn, mi korespondas aŭ skribas artikoletojn aŭ versaĵojn por la murgazeto de poŝto-telegrafo. Mi estas kunlaborantino de la murgazeto (t. n. "stenkor").

Ofte mi iras kun la edzo en poŝtklubon, kie okazas kunvenoj kaj koncertoj. Se mi havas monon, mi vizitas kinon aŭ teatron kun mia edzo aŭ la patrino. En provizora laboro min anstataŭas mastrumante mia patrino. Je la dudekkvara mi enlitiĝas. Somere mi ekskursas kamparon, arbaron, boatpromenas kaj malofte restas en ĉambro. Du semajnojn mi travivas en ripozdomo, kie mi tute ripozas de urba vivo. Tiel pasas mia edzina vivo.

6289, Sovetio.

Nî ne povos prave fanfaroni pri la prospereco de nia movado tiom longe, kiom "Sennaciulo" ne eĉ havas 4000 abonantojn.

K-doj! Ĉu do vi ne komprenas la gravecon de la gazetaro en nia epoko?

Varbu, varbadu abonantojn!

Buĝeto de medicina laboranto en Sovetio

Centra Komitato de la profsindikato, unuiganta laborantojn, okupatajn en diversaj medicinaj institucioj (kuracistoj, ties asistantoj, flegistoj, ruĝkrucanoj ktp.) faris statistikan studesploron pri la buĝeto de mezkvalifikita sindikatanaro.

La rezultoj de tiu ĉi studesploro estas kompareblaj kun tiuj de la samspeca studesploro, kiun oni faris en la jaro 1924, t. e. antaŭ preskaŭ 4 jaroj. La komparo konstatigas, ke la meza enspezo de l' familio, prezentanta meznorme la familion de mezkvalifikita laboranto, pligrandiĝis je 40% en preskaŭ ĉiuj regionoj de Sovetio, kie estis objektoj de la enketado.

La plej alta cifero de opa buĝeto por la tuta familio estis konstatata (en marto 1926) en Tiflis, — 108,02 rubl., kaj la plej malalta en Tambov — 63,85 rbl. La plialtiĝo de la salajraro esprimiĝas je 35%; la ceteraj 5% de la buĝeta pliiĝo konsistas el enspezo per vendo de siaj havaĵoj, monhelpoj de parencoj k. c.

La studesploron karakterizas jenaj ciferoj de ĝia statistika bazo: Kvanto da familioj, loĝantaj en diversaj regionoj, kies buĝetoj estis studataj: 81. Meza kvanto da familianoj, kiuj konsistigas meznorman familion: 3,06 homoj. La kvanto da plenaĝuloj en meznorma familio: 2,24 pers. La kvanto da personoj en sama familio, kiuj ricevas salajron: 1,21.

La analizon de familia buĝeto esprimas jenaj tabeloj:

1. Elspezoj. En marto de jaro 1926

Nomoj de kategorioj	Sumo en červ. rbl.	%
1. Lupago por la loĝejo	5,20	6,5
2. Hejtiloj kaj lumigado	6,93	8,6
3. Nutrado (por tuta familio)	40,53	50,4
4. Alkoholaĵoj	0,34	0,4
5. Tabako, fumaĵoj, alumetoj	0,80	1,0
6. Vestaĵoj kaj ŝuoj	10,74	13,3
7. Kudrado, flikaĵoj k div. tualetaĵoj	2,44	3,1
8. Lavado de vestoj	1,02	1,3
9. Higienaĵoj	0,63	0,8
10. Kuracado kaj medikamentoj	0,29	0,3
11. Mastrumaĵoj	1,39	1,7
12. Gazetoj, ĵurnaloj k literaturaĵoj	0,57	0,7
13. Klerigado de infanoj	0,58	0,7
14. Teatro k. c. kulturaj plezuroj	0,80	1,0
15. Kotizo al profsindikato	1,12	1,4
16. Diversaj elspezoj de soci-politika karaktero	0,74	0,9
17. Monhelpo al parencoj	1,20	1,5
18. Elspezoj por la propraj entreprenoj	0,45	0,5
19. Religio	0,02	0
20. Ceteraj elspezoj: pago pro ŝuldoj %-aĵoj de pruntoj k. s.	4,73	5,9
21. Neregistritaj elspezoj	0,59	0
Sume:	81,08	100

Suma enspezo de unu laborulo el la kategorio de mezkvalifikitaj personoj (kuracistaj asistantoj, flegistoj) en marto 1926 estis 56,99 rbl., la salajro atingis 42,80 rbl. monate.

2. Enspezoj (por unu meznorma familio)

Kategorioj de la enspezoj	Sumo en červ. rbl.	%
1. Salajro de familia ĉefo	49,60	61,2
2. Honorario, ricevata per privata praktikado aŭ dungiĝo de la eksteroficaj laborejoj	1,70	2,1
3. Monhelpo kaj kompensaĵoj el la asekura kaso	1,75	2,2
4. Ceteraj enspezoj de familia ĉefo	1,65	2,0
5. Salajro de aliaj laborantaj familianoj	7,27	9,0
6. Eventualaj enspezoj de la familianoj	1,82	2,3
7. Enspezo per produktoj de la propra mastrumado	0,16	0,2
8. Vendo de propraj havaĵoj	1,04	1,3
9. Prunteprenoj ĉe interhelpa kaso	1,42	1,8
10. Prunteprenoj ĉe privatuloj	4,16	5,1
11. Kredito ĉe butikoj kaj kooperativoj	1,49	1,9
12. Monhelpoj de parencoj	0,84	1,0
13. Ricevitaj el ŝparaĵoj kaj havataj provizoj	6,27	7,7
14. Ceteraj enspezoj	1,75	2,2
15. Neregistritaj enspezoj	0,16	0
Sume:	81,08	100

La buĝeto de nuna jaro supozeble neniom diferencas de la tabelaj ciferoj por 1926. Projektante la ŝtatan buĝeton por 1928 oni stabiligis la antaŭajn normojn de la salajro. La dekretita salajro por kvalifikitaj personoj (helpkuracistoj kaj ĉekuracistaj asistantoj) varias laŭ tarifaj zonoj en diversaj teritoroj inter limoj de 37—50 rbl., por flegistoj inter 27—39 rubloj.

Bedaŭrinde mi ne disponas nur fidindajn statistikojn pri antaŭmilitaj buĝetoj de samaj laboruloj, sed sufiĉas noti por tarifa komparo, ke antaŭ la milito kuracista asistanto loĝanta ĉe la kuracejo, ricevis monatan salajron de 35 rbl. plus senpaga loĝejo kun la tagmanĝo. Tiu salajro estas ekvivalenta je 70 rbl. ĉervoncaj (laŭ proksimuma, t. e. rondcifera indekso).

Laŭ oficialaj materialoj elĉerpis (3637).

Al kelkaj korespondantoj

Okaze de la publikigo de mia studo pri Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, mi ricevis sufiĉe multe da leteroj. Ĉiuj korespondantoj konsentis, ke la temo estas tre interesa kaj devas esti sufiĉe larĝe pritraktata. Sed kelkaj opinias, ke tiu felietona publikigado ne estas oportuna; ili deziras, ke la verkaĵo aperu libroforme, ne en "S-ulo".

Bedaŭrinde jam ne mankas manuskriptoj tute pretaj, kiuj atendas sian apervicon. Niaj eldonfortoj estas ja malgrandaj. Sekve ni ne scias, kion decidi. Estas evidente, ke se la granda plimulto da legantoj ne ŝatas tiun felietonan publikigadon, ni tuj rezignos. Ne estas en tio ia ajn domaĝo. Mi ja atingis la finon de la unua parto de la studo kaj tiu unua parto — same kiel la du aliaj — formas en si unu tuton.

Antaŭ ol iel ajn decidi, mi atendos koni la opinion de la Legantaro.

Hodiaŭ mi nur diru, ke laŭ mia plano, la partoj pri Internaciismo kaj Sennaciismo estos pritraktataj sammaniere kiel la unua pri Patriotismo. Mi celas pruvi, ke la Internaciismo estas nur ia kompromiso inter diversaj naciismoj, ke tia kompromiso ne estas kontentiga solvo de l' problemo, ke nur la sennaciisma vidpunkto estas racia kaj ĝusta.

Mi kredas, ke simila pritraktaĵo ne estis ĝis nun farita en iu nacia lingvo. En multaj verkoj oni ja povas trovi pli malpli nebulajn aludojn idealismajn pri tutmonda respubliko, pri mondcivitaneco k. s.; sed nenie mi vidis la demandon priparolitan sufiĉe amplekse kaj iel konkrete. Pri tio mi ŝatus koni la opinion de ĉiuj interesatoj. Kritikojn, rimarkojn, konsilojn mi volonte akceptos . . . E. L.

MONDVOJAĜO PER ESPERANTO

K-do Paul Posern el Döbeln (Germanio), 25-jara, entreprenos post kelkaj semajnoj mondvojaĝon per esperanto, traveturonte per biciklo Ĉeĥoslovakion, Aŭstrion, Jugoslavion, Bulgarion, Rumanion, Turkion, Persion, Hindion, Aŭstralion, Japanion, Amerikon, Eŭropon. Li intencas resti 2½ ĝis 3 jarojn, kaj ĉie paroladi en kaj por esperanto. Vidu ankaŭ la anoncon en tiu ĉi n-o.

Korektoj

Legu en n-o 191, pĝ. 285, 3-a kolono, 12-a linio de supre anst. "fakultativan" — "nedevigan". Ni erare uzis neoficialan vorton. Pĝ. 281 legu en la unua kolono, 30-a linio de malsupre: "kampo" anst. "tereno", same en 2-a kolono, 5-a linio de malsupre, ĉar tiu lasta vorto ne estas oficiala, kaj ĝia senco en nia lingvo ne difinita.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

PRAKTIKU KORPOKULTURON!

La sola kapitalo de laboristo estas lia sano, de ĝi dependas ne nur lia propra bonfarto, sed ankaŭ la sorto de liaj familianoj. Tial la konservo de la saneco por laboristo estas la plej necesa kondiĉo por lia ekzisto. Metodoj por ĝia konservo ekzistas tre diversaj. Proverbo diras: Kiu ripozas, rustiĝas. Tial ni movu la korpon kaj zorgu, ke la sanigaj fortoj de la naturo estu kontraŭmetataj al la malutiloj de la vivado en polvaj loĝejoj kaj laborejoj. Speco de l' korpokulturo, entenante ĉiujn bonajn ecojn de aliaj korpekzercoj, estas la naĝado. Do ni aŭdu kion diras la estro de naĝsporta fako en Laborista Gimnast- kaj Sportasocio de Germanio:

Kial laboristo naĝadu?

de K-do H. Biegel, Leipzig

Unu el la korpekzercoj plej longe konataj estas la naĝado. Jam la prahomo devis aplikadi ĝin, por transiri la akvaĵojn, ĉar pontoj kaj ŝipoj ne jam ekzistis. Certe tiu naĝado tute ne similis la hodiaŭajn specojn de la naĝsporto, sed estis eble tia naturnaĝado, ekzercata samkiel grimpado kaj kurado.

Sed malgraŭ tio, ke naĝado estas efektiva aplikarto, estas konstatite, ke nur tre malgranda elcento da homoj estras ĝin. En Germanio nur 3—4% el la loĝantaro scias naĝi. Tamen Germanio havas precipe grandnombran naĝsportan organizon.

En "Laborista Gimnast- kaj Sportasocio" (Arbeiter-Turn- und -Sportbund) estas organizitaj ĉ. 67 000 naĝuloj. Kial do la praktikado de naĝado estas tiom grava por laboristo? Granda plimulto el niaj samklasanoj devas loĝadi en malgrandaj, senlumaj kaj senaeraj loĝejoj. Same la profesia laboro estas plenumata en mucidaj, kotplenaj ejoj. La laboro plejparte ankaŭ estas malpuriga.

Pro la loĝeja mizero kaj nesufiĉa salajro la sanstato de l' Laborularo estas eksterordinare malbona. Maltroa nutrado kaj vivado en loĝejoj malvastaj, senlumaj, grave favoras malsaniĝon je rakito kaj tuberkolozo. Tiuj malsanoj pli facile estas kontraŭbatal-eblaj, se la korpo senpere ricevas lumon, aeron kaj sunradiadon. Sed naĝado postulas senvestigon de la korpo kaj ties kvazaŭ devigan elmeton al aero, suno kaj akvo. Do dum naĝado samtempe koincidas korpekzerco kaj tutkorpa purigo. La intensa spirado dumnaĝa aerumas niajn mistraktitajn laboristajn pulmojn ĝis en la plej malcentraj pintoj kaj tiel profilaktas kontraŭ tuberkulozo. La aero tuj super la akvo estas perfekte senpolva kaj tial povas esti spirata intence per buŝo malferma.

Plua avantaĝo naĝada estas la utilo por la sangocirkulado kaj de organoj dependaj de ĝi.

Per la incito de akvomalvarmo la sango estas premata al la internaj angioj por reflui des pli forte al la eksteraj. Ĉar la refluanta sango estas grave pliriĉigita je oksigeno, ĝi pli bone povas nutri la muskolojn.

La tutkorpa rektigo, nepre necesa dum naĝado, tre favoras la sintenon de homo, ke do krom fortega laboro muskola, nepre laŭskema, la efiko por la tutorganismo estas kiel eble plej bona. Pro ĉio ĉi preskaŭ ne ekzistas dua korpekzerco por laboristoj, kiu tiom intense influas la korpon.

Menciata ankoraŭ estu speciala avantaĝo de naĝado: Kiu scias naĝi sekure, ne facile dronas. Sed naĝanto sufiĉe sekura povas savi aliajn homojn el drono, kaj tio estas la plej grandioza kaj nobla en la naĝmovado.

En Germanio dum la lastaj 15 jaroj dronis pli ol 70 000 homoj ĝis 24-jaraj, pli ol 90% el ili estis laboristoj. Tial praktiku naĝan sporton kaj lernu savadon en Laborista Sportunuiĝo.

Trad.: Hergesell, Görlitz.

KIEL ĈI TIU NAĜULO

vi kontraŭnaĝos la fluon de la vivo,



se vi lernas kaj praktikas naĝadon en la

LABORISTA SPORTMOVADO

La kresko de nia movado dependas de la aktiveco de nia anaro, kunlaboro al "Sporta Paĝo de S-ulo" antaŭenpuŝos la disvastigon de esperanto en sporta medio.

Esperanto marŝas!

La Fakkomitato por Piedpilko en la Socialista Sport-Internacio Laborista eldonis Kontrakton trilingve: esperante, germane, france. Tio estas ĝojiga sukceso k bonega propagando por esp-o, en kiu la teksto estas unuavice presita. Bedaŭrinde la traduko montras kelkajn gramatikajn erarojn, kiuj cetere ne ĝenas la sencon. — Red.

Malpermeso de la Praha Spartakiado

Kiel konate, la ĉeĥa sekcio de la Ruĝa Sportinternacio volas aranĝi en somero paralelan feston al Moskva Spartakiado. La festo, kiu devus okazi dum aŭgusto en Praha, nun laŭ dekreto de la reakcia ĉeĥa registaro estas malpermesita.

Motivita estas la malpermeso per la politika propagando, kiun kaŭzus la aranĝo. La stulteco de tia agado malnecesigas komenton!

TRA ESPERANTIO

Superpartieco

Se ni varbas al SAT senpartianon, li baldaŭ celas, ofte senkonscie, fari el nia organizo ian partion. Li provas trudi al ĝi taskojn, kiujn plenumi povas nur politikaj aŭ sindikataj organizoj ...

Se partiano aliĝas, li simile celas, ke SAT akceptu kaj subtenu la politikon de lia propra partio. Kiel ĉiu scias, en ĉiuj partioj okazas bataloj inter diversaj tendencoj, kaj nia varbito emas eĉ enŝovi en SAT la vidpunkton de la tendenco, al kiu li apartenas en sia partio! ...

Ĉiu observemulo ja povas fari tiajn konstatojn.

Por ke nia Asocio povu normale malvolviĝi, bone funkcii, kaj ludi sian propran rolon, nepre necesas, ke la supre menciita spiritostato malaperu el niaj vicoj. La SAT-anoj devas kompreni, ke nia peresperanta tutmonda organizo estas neniel komparinda kun politika partio; ke ĝi ne povas ludi rolon de sindikato; ke ĝi sekve devas havi tute apartajn taskojn; ke ĝia celo devas havi propran karakteron.

Estas vero, ke SAT celas utili al ĉiuj laboristaj organizoj klasbatalaj senescepte. Kiel do ĝi povas tion fari? Kiel anoj de diversaj inter si batalantaj organizoj povas kunlabori en sama asocio? Unuavide tio ŝajnas neebla. Kaj fakte ĝi estus tia, se la membroj havus eraran komprenon pri la celo kaj taskoj de laborista esperanta organizo tutmonda.

Ni celas utiligi praktike esperanton. Kion signifas tio? Tio signifas, ke per nia lingvo ni volas interrilati kun samcelanoj el ĉiuj landoj.

— Kiel povas tio utili al mia partio, al mia sindikato? eble demandos iu. Facila estas la respondo: Ĉu do via organizo ne celas kunligi internacie la laboristojn? Ĉu vi mem ne konvinkiĝis, ke via propra emancipiĝo dependas de la emancipiĝo de ĉiuj laboristoj en la mondo? Se vi estas ministo, ekzemple, ĉu vi jam ne spertis, ke la labor- kaj viv-kondiĉoj de viaj sammetianoj en aliaj mondpartoj influas sur viajn proprajn? Certe jes. Sekve vi havas intereson ekkoni pri tiuj kondiĉoj. Kaj se per esperanto vi ricevos ĝustajn informojn, vi konigos ilin al la estraro de via sindikato. Tion farante, vi ne nur praktike utiligos esperanton por la servo de via sindikato, sed plie vi pruvos per faktoj, ke simplaj laboristoj povas senpere interrilati laŭ tutmonda skalo; ke estas eble forigi jam nun la lingvajn barojn; ke la laboristaj organizoj povus ŝpari tempon kaj monon per la alpreno kaj praktikado de esperanto.

En iu politika Internacio oni preparas internacian kongreson. Gravaj demandoj kuŝas en la tagordo. Temas decidi pri nova orientiĝo de la tuta organizo. Akraj polemikoj okazas en ĉiulandaj partioj inter la diversaj tendencoj. Por akceptigi siajn tezojn, gvidantoj citas erarajn faktojn aŭ prisilentas ion gravan. Ili havas en la manoj la tradukaparaton de la partio; ili sekve povas konigi nur la faktojn, kiuj apogas ilian vidpunkton. Sed per esperanto vi estas ligita kun samtendencanoj en aliaj landoj; de ili vi povas ricevi informojn; vi tiel povas kontroli la dirojn de viaj gvidantoj aŭ tendenckontraŭuloj. Ĉu do tio ne estus praktika utiligado de esperanto por via partio?

Mi povus citi diversajn aliajn ekzemplojn. Tiuj sufiĉas por montri, kiel esperanto povas esti utiligata de ĉiu SAT-ano por siaj apartaj celoj, ĉu partiaj, ĉu sindikataj, ĉu kooperativaj ktp.

Estas memevidente, ke esperanto per si mem tute ne sufiĉas. Nia lingvo estas kvazaŭ telefonaparato, kiu bezonas esti fadenligita kun similaj aparatoj por povi utile funkcii. En la apliko de esperanto, SAT ludas la rolon de la fadenaro en telefonio. Per sia Jarlibro, per siaj presorganoj ĝi ebligas la interrilatiĝon, la interkonatiĝon sur tutmonda skalo inter sampartianoj, sammetianoj aŭ samtendencanoj.

Sed, se oni enkondukus en la SAT-rondoj, en la SAT-organoj disputojn kaj polemikojn, ĉu tio signifus meti esperanton je la servo de l' Proletaro? Tute ne. Tio signifus nur konfuzon, miskomprenon pri la rolo, kiun povas nuntempe ludi nia lingvo; tio signifus plie la baldaŭan disfalon de SAT en malgrandajn, sensignifajn sektojn. Pri tiu aserto bonan pruvan ekzemplon liveras la ekzisto de TLES.

La SAT-aparato ebligas al anarkistoj, al komunistoj, al socialistoj, al senpartiuloj, al sindikatanoj, al ĉiuj ajn laboristoj, kiuj batalas kontraŭ la kapitalista sociordo, interrilatiĝi, interkonatiĝi kaj ricevi informojn, kiujn ili povas utiligi polemike e k s t e r SAT kontraŭ malsamtendencanoj, malsampartianoj.

La SAT-organoj ankaŭ ebligas objektivan, seninsultan diskutadon pri ĉiuj teorioj, pri ĉiuj vidpunktoj. Per la komparo de diversaj ideoj kaj tezoj ĉiuj SAT-anoj povas tiri profiton por sia meminstruiĝo. Kiuj neniam aŭdas alian vidpunkton, ol tiun, kiu estas defendata en la organoj de ilia partio, tiuj riskas fariĝi kredemuloj, similaj al religiuloj. Liberpensantaj homoj devas gardi sin kontraŭ ĉia fanatikeco. Kaj tio estas ebla, nur se ili kutimas de tempo al tempo enspiri alian aeron ol tiun, kiun ili enspiras en sia propra partio, en sia propra korporacio.

En la politiko, en la bataloj de la laborista movado regas pasio. Tio estas neevitebla. Sed la pasio ne ĉiam devas regi la spiritojn. Necesas kelkfoje, ke ili penu pensi objektive, racie. SAT povas esti tiu loko, kie forestas pasio, kie regas Racio. Homoj, kiuj uzas racie elpensitan lingvon; homoj, kies agado celas detrui la rutinon, la tradiciojn, povas per tio stari sur pli alta ŝtupo ol aliaj. La SAT-anoj povas, devas fariĝi la "plej perfektaj el la t. n. internaciistoj" estas dirite en la Statuto. Ĉu ni ĉiuj bone komprenas la profundan kaj larĝan signifon de tia postulo? Estas dube. Necesas unue por tio, ke ĉiu firme konvinkiĝu pri la graveco kaj seriozeco de nia movado. Ni ne esperu la savon de ia ajn mesio. Ne la gvidantoj de laboristaj organizoj malaperigos la lingvajn barojn. Ili ne havas intereson en tio. Tute male: la pli malpli poliglotaj gvidantoj havas ĉefe intereson konservi sian postenon. Esperanto ne povas nun helpi al ili en tio.

"La emancipiĝo de la Laboristaro rezultos el la agado de la laboristoj mem", estas prave dirite en fama manifesto. Same la lingvaj baroj disfalos nur per la agado de la esperantistoj mem. Tial necesas, ke apud la aliaj laboristaj organizoj SAT ekzistu memstare; ĝi devas konscie ludi sian propran historian rolon, havi sian propran taktikon, kaj eĉ iarilate sian propran ideologion.

Tio devas kaj povas okazi senkonflikte kun la aliaj laboristaj organizoj. Superpartieco ja ne signifas kontraŭpartiecon.

E. L.

IAMA ESPERANTISTO

K-do 2921 en n-o 186 de "S-ulo" instigas moskvajn SAT-anojn atenti pri iama esperantisteco de K-do Stalin. Hodiaŭ mi faras la saman instigon pri iama agema esperantisto, K-do A. Ŝilov, la sekretario de Moskva Gubpross (Gub. Prof. Unuiĝo de Kleriglaboristoj). En 1907/09 en unu el la "ursaj" anguletoj de cara Rusio en ekzilejo K-do Ŝilov sukcesis perfekte ellerni esperanton kaj organizis esperantan rondeton en terure malfavora situacio, kiun li sindoneme gvidis. Li korespondadis tre akurate kun multnombraj korespondantoj de diversaj landoj, informante ilin pri tiama cara reĝimo. Nun K-do Ŝilov ne plu partoprenas en esperanta movado. Al mi ŝajnas, ke la esperantist-laborista movado ne estas tiel riĉa je agemaj laborantoj, por facilanime perdi K-dojn. Moskvanoj, rememorigu al K-do Ŝilov lian iaman esperantan laboron kaj revenigu lin al ni. (3980)

SVEDA INSTRUISTARO KAJ ESPERANTO

En Stokholmo okazis granda publika ekzameno por ĉ. 500 personoj el naŭ finitaj rapidkursoj de s-ro. Ĉe, kiu per lerta instrumetodo sen lernolibroj sciis interesigi la lernantojn en siaj kursoj. I. a. partoprenis la socialista urbestro de Stokholmo kun siaj familianoj kaj diversaj infanklasoj. La tuta gazetaro raportis pri tio tre favore. La plej grava efiko estis, ke la Sveda Instruista Unuiĝo kaj la Sveda Instruistina Unuiĝo decidis aranĝi somerajn esp. kursojn por la tutlanda sveda geinstruistaro. La alvoko jam aperis en la oficialaj geinstruistaj gazetoj.

Tutmonda Ligo por Seksaj Reformoj

Tiu ĉi Ligo (mallongigite: W. L. S. R. = World League for Sexual Reform) uzas esperanton en sia korespondado k eldonaĵoj. La Labor-Komitato konsistas el: Maria k Paul Krische (Berlin), Hertha k Walter Riese (Frankfurt a. M.) k J. H. Leunbach (Kopenhago). (Aliĝoj al d-ro Leunbach, Kopenhago, Stokholmsgade 39, jarkotizo 5 gmk.) La celo estas praktike utiligi la rezultojn de sekso-sciencaj esploroj per 1. unuigo de ĉiuj samideanoj en la mondo; 2. kiel eble plej granda disvastigo de sekso-scienca intuo (sciado); 3. batalado kontraŭ la antaŭjuĝoj k aranĝoj, kiuj kontraŭstaras racian reguligon de la seksaj aferoj. Ĝi intencas eldoni monatan revuon Sexualreform en angla, franca, germana k esperanta lingvoj. La unua mondkongreso okazos de 1.—5. julio 1928 en Kopenhago. Lingvoj permesataj: angla, franca, germana k esperanta.

PRIKONGRESAJ PROPONOJ

Propono 1

Aldoni al unua ĉapitro de la Statuto jenan tekston:

SAT, ne estante politika sed nur kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas, per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de kulturo kaj civilizeco.

SAT-ano 1.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

AŬSTRIO. Vieno. 13. 4. la esp. kursgrupo de la orientfervojistoj (kursgvid. Zink) aranĝis finfeston kun riĉa programo prezentita nur de la komencantoj. Krom deklamoj oni prezentis en esp-o komedion "Lumpacifagabundus" de Nestroy. Post perfektiĝo kelkaj el la kursanoj aliĝos al SAT. (9437.) —**SOVETIO. Novorossijsk.** 6. 5. okazis unua distrikta konferenco de SEU-anoj k rondetanoj, ĉeestis 43 pers. Kiel estraranoj estis elektataj K-doj Borovskij, Nikonov k Kapustin. La konferenco konstatis kreskon de la movado en la distrikto. (P. K.)



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

E. Lanti, For la Neŭtralismon! 3-a eldono. Broŝ. 32 pĝ. Form. 12×18½ cm. Eld. SAT, 23, Rue Boyer, Paris 20. Mendebla ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27. Prezo 0.30 gmk. aŭ ekvivalento. — Tiu nova eldono, plibonigita, entenas krome difinojn de la vortoj "Burĝo, Internaciismo, Patriotismo, Proleto, Revolucio, Sennaciismo k. c.", organiz-figurojn, novan antaŭparolon. — Tre agrable mi legis ĝin, ĉar svarmas en ĝi fortaj ideoj. Ekzemple, pruvante, kiel esperanto nur estas ilo, ne celo per si mem, ilo kiun pastraro, policaro fiuzas laŭvole, nia K-do montras diversajn aliajn homajn kreaĵojn, kiuj ŝajnis liberigiloj, sed kiuj utiliĝis kontraŭ libereco, kaj nur uziĝos revolucie dank' al konscia revoluciularo. — Tiel restas post legado en la kapo de leginto ne nur ĝusta ideo pri esperanto, sed ankaŭ multaj aliaj pensigaĵoj. Mi kredas, ke tial la broŝuro legiĝas tiom agrable, ĉar abundas ideoj kaj faktoj en ĝi. Ni dezirus povi diri la samon pri ĉiuj broŝuroj, aŭ eĉ libroj. — Vero nur valoras laŭ la fortoj kaj talentoj, kiuj puŝas ĝin. La libreto de nia K-do E. Lanti semas tiajn fortojn, lumigas klarege multajn verojn pri esperanto kaj proleta movado, kiujn ni neniam sufiĉe konas, eĉ ofte tute ne. Jief.

Al la Esperantistaro. Okpaĝa 24×27 cm pamfleto de UEA-anoj kontraŭ la nuna Estraro de tiu asocio k ĉefe kontraŭ ĝia prezidanto. Prezo: 6 ekz.: 1 sv. fk., 15 ekz.: 2 sv. fk., 45 ekz.: 5 sv. fk. Havebla ĉe: G. Delanoue, 4, rue Charles-Divry, Paris 14. — Antaŭ nelonge, s-ro Teo Jung skribis en sia "Heroldo", ke io putras en Esperantio. Ĉu li parolis ĝuste? Pri tio ni ne volas decidi, sed tamen opinias, ke ni ne povas tute prisilenti la aferon — despli, ke troviĝas ankoraŭ multaj lab. esp-istoj, eĉ SAT-anoj, kiuj aliĝas al UEA. Ili do esploru la aferon k decidu, ĉu ili saĝe agas, fordonante monon al la "putriĝanta" neŭtrala movado.

La Lingva Angulo

Demandoj.

1. Ĉu estas la **sama** senco en la frazoj: "Espereble mi baldaŭ ricevos respondon" k "Esperinde mi baldaŭ ricevos respondon". "Esperinde" ŝajnas al mi pli logika.

2. Bonvolu klarigi la frazon "anstataŭu patron **al** la orfo", kiu troviĝas en "La Revizoro" (Zam.), p. 91.

3. Ĉu la frazo en "Petro" pĝ. 25 estas ĝusta: "Ĉu Petro **trafis** hejme sian kamaradon?" Aŭ ĉu oni devas uzi alian vorton, ekz. **renkonti?** — (6707.)

Respondoj.

1. En tiu de vi citita frazo la nuanca diferenco estas preskaŭ nula, kaj vi pravas en tio, ke la pli logika formo estas "esperinde", dum "esperebla" estas tiu formo, kiu praktike enkondukiĝis per la lingva uzo (Ne ĉiam la rigida logiko valoras!). — Por montri tamen, ke oni pravas kunligi tiajn verbojn kiel "esperi, kredi, deziri ktp." foje kun "eble" kaj foje kun "ind", kaj ke la senca diferenco povas esti tre granda, ni citu jenan ekzemplon: "Li troviĝas en senespera stato. Lia resaniĝo estas esper**inda,** sed ne esper**ebla.** Tiu sciigo estas kred**inda,** sed ne kred**ebla.** Tio estas dezir**inda** kaj eĉ dezir**ebla**, sed bedaŭrinde nerealigebla. **(En** la lasta frazo la nuanca diferenco estas pli malforta.)

2. La senco ŝajnas sufiĉe klara al ni: "La senpatra infano (orfo) havu patron. Tiu patro-anstataŭanto estu li (la ordonita persono)." Anstataŭ "al" same bone oni povus uzi "por" aŭ "je" en tiu ĉi frazo.

3. "Trafi" en tiu senco ne estas malkorekta, se oni pripensas, ke ĝi havas la sencon de "celatingi" (ĉu estas objekto aŭ persono, kiu "trafas", ne ludas rolon en la difiño de l' vorto). "Renkonti" estas pli ĝenerala kaj sekve pli multe aplikebla vorto. Oni povas "renkonti" iun okaze, hazarde, dum oni povas trafi "iun" (aŭ ion) nur per celado. La vorto trafi povas esti uzata metafore k senmetafore.

Al 1741. — Tiele starigitan demandon ni ne povas respondi. Vi devus citi ekzemplojn. **4666.** — Vian duan demandon ni ne povas respondi, se vi ne citas la tutan frazon aŭ la paĝon, kie vi trovis ĝin. Interimo.



Kamarado serĉata!

Kiu volas akompani min dum mondvojaĝo? Franciano preferata, sed ne kondiĉo. Li devas esti bona esperantisto k biciklisto, eble iom muzikema, k disponu pri iom da mono. Leterojn oni direktu al **K-do Paul Posern, Döbeln i. Sa.,** Zwingerstr. 41 (Germ.).

Britiaj K-doj, atentu!

Ĉu troviĝas en Anglio grupo aŭ peranto, kiu deziras korespondadi kun Pariza distrikt-grupo pri ĉiuj temoj?

*

Skribu al jena adreso: Alfred Tanier, 76, rue Monge, **Paris V.**

Instruisto kaj edzino vizitontaj Kopenhagon, meze de julio, deziras loĝadon kun esperantistoj tie.

Bonvole respondu, donante kondiĉojn, al **John Wilkie,** 65 Braeside Street, **Glasgow** (Britio).

Studentoj de Germanio

Ne rifuzu informi min pri supera teknika lernejo, troviĝanta en via urbo, nome: 1. Ĉu oni akceptas tie kiel studantojn sovetlandajn junulojn; se jes: Ĉu oni limigas kvanton da Sovetianoj per certa elcento? 2. Kiujn dokumentojn devas prezenti sovetia junulo. 3. Ĉu fininte sov. lernejon de 1-a kaj 2-a ŝtupo (kune 9 jaroj) oni devas fari ekzamenon enirante vian sup. tekn. lernejon? aŭ ĉu oni akceptas sen ekzameno? 4. Kiun tekn. specialecon donas via tekn. sup. lern.? 5. Daŭro de lernado en ĝi? 6. Kiom faras en via urbo la lupago por plej modesta studenta ĉambreto? 7. Kiom kostas monate plej simpla, sed nutra tagmanĝo? — Bonvolu respondi laŭ adreso: **T. Dajber, ul. Sakko i Vancetti, 23 kv. 9, Orel (USSR).** Akceptu antaŭe koran dankon.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Coopérateur, Paris, majo, Indiĝ. vivo en Sudafr. (170), Komuno Sknemvar (185); Krasnaj-Til (Ruĝa Postfronto), Ivanovo-Voznesensk, n-o 8, Ekzekutisto k viktimo (182), El Nederl.

Priesperantajn artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, London, 18. 5., The Educational Worker (Eduklaboristo), London, majo; Ruhr-Echo, Essen, 21. 5., Freidenker (Liberpensulo), Lodz (dato?); D. Deutsche Eisenbahner, Berlin, 13. 5., 20. 5. (kurso).

Peresperantajn artik. k notojn presigis:

Arbejder-Bladet, Kopenhago, 4. 5.; Freie Sportwoche, Leipzig, 21. 5.; Sächs. Arbeiter-Ztg., Leipzig, 15. 5.; Juna Teksisto, Ivanovo-Voznesensk, n-oj 33, 34; Kremenĉuga Laboristo, 1. 5.

NIA POŜTO

9437. — La "semajno el mia vivo" de via lernanto aperos siavice; ni jam havas multajn, kiuj atendas.

2105. — Vi vidas en tiu ĉi n-o, en kia formo ni uzis viajn sendaĵojn. La raporto pri la katastrofo taŭgas por ĉiutaga ĵurnalo, sed ne por "S-ulo". Ni jam legis detalajn raportojn pri tiu okazintaĵo.

10 085. — Via "Tago" aperos siavice, t. e. post du aŭ tri semajnoj. Red.

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BRITIO

K-do H. Ward, 1 School St., Nelson, Lancs. dez. koresp. kun SAT-anoj vizitontaj la Antverpenan kongreson el ĉl.

— Esp.-grupo en St. Albans dez. koresp. kĉl. Adr.: Labour Club, Alma Rd. St. Albans, Herts. Certe resp.

ĈEĤOSLOVAKIO

— Lab. esp-istoj de Nixdorf, dez. koresp. kolektive k individue kĉl. pri ĉ. temoj, Skribu al: J. Scheffler, Nr. 489/5, N. Nixdorf.

GERMANIO

K-do Hans Ross, Beim Waisenhaus 2, Rostock, dez. koresp. kĉl. krom Sovetio.

K-do Heinz Junge, Molkenstr. 17, Rostock, dez. koresp. kĉl.

— Du lernantoj dez. koresp. kĉl. L, PI, PM, bfl. Adr.: Leopold, Anhalt, Brandenburger Str. 138, Werder a. Havel.

K-do Richard Pförtner, Petzoldstr. 11, Sebnitz i. Sa., dez. koresp. kun kursgvidantoj laŭ "Petro" (parola metodo).

K-do Alfr. Zeidler, Wilkau i. S. Nr. 241, dez. koresp. kĉl. L, PI, Resp. garantiata.

K-do Kurt Teubel, Ohorn i. S., dez. koresp. kĉl. pref. kun Sovetio pri komunaj k privataj sociaj asekur-movadoj.

— 10 Gek-doj ĵus absolvintaj kurson por komencantoj dez. koresp. kun gek-doj alilandaj. Skribu al: K-do P. Köckeritz, Tharandter Str. 6/4, Dresden-A 28.

K-do Ernst Dretzke (naturamiko), Burggässchen 5, Sebnitz i. S., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do August Singer, Elfenstr. 61, Mannheim (junkom.), dez. koresp. k gek-doj ĉl.

K-do Kurt Hillme, Promenade 26, Sebnitz i. S., dez. koresp. kĉl. gek-doj pri ĉ. temoj, precipe pri fiziognomiko.

LATVIO

K-do K. Kronis, L. Altanovas iela 7. dz. 1, Riga 4, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PI, bfl.

PALESTINO

K-do Dunajevskij, Palestino, Tel. Aviv, Herzelia, Zono 3, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, il. gaz.

POLIO

K-do Johano Zawada, ul. Grazyny 13, Warszawa-Mokotów, dez. koresp. kĉl. precipe pri kooperativismo, anarĥismo k socialisma konstruktiva laboro.

SOVETIO

— Jungrupo de esp.-lernantoj dez. koresp. kun tutmonda junularo, L, PK, PI, PM, bfl. Adr.: Vjatka, str. de Lenina 104, Pedagog. Teknikumo al M. M. Dobrovolskij (por grupa lernejo).

K-do A. Ĉupaĥin, str. Poroĥovaja, 42, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kun junaj K-dinoj el ĉl.

K-do A. Krivoŝejev, str. 2-a Krasnoflotskij per. 5, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj L, PI.

K-do V. K. Jodko, Poŝtkesto 13, Tomsk (Siberio), dez. koresp. kĉl., precipe kun fervojistoj, L, PI.

K-do N. Denisov, Socialistiĉeskaja 26, Ĉerepovec, dez. koresp. pri literaturo, etnografio k socia vivo, L, PI, bfl.

IRH- kaj SAT-anoj, atentu!

La Distrikta Komitato de IRH (MOPR) tre deziras aranĝi korespondadon kun IRH-organizoj kaj individuaj IRH- kaj SAT-anoj pri IRH-laboro, pri kondiĉoj de vivo kaj klasbatalo de Laboristaro en ĉiuj landoj, ankaŭ kun politikaj malliberuloj pri ilia vivo.

Kamaradoj, sciigu nin pri viaj adresoj! Pruvu vian proletaran solidarecon! Respondo garantiata. Adresu al **K-do Vladimir Blagovidov, Sizrano,** Uljanovska gub., str. Kolosova, 8 (USSR).

— Instruistoj k ruĝarmeanoj dez. koresp. kĉl. L, PK, PI. Adr.: Kruĵok Esperanto, Dom rabotnikov, Prosveŝĉen., Klin, Mosk. gub.

K-dino T. Aleksandrova (junkom., oficistino), dez. koresp. kun gejunkom. k geoficistoj. Adr.: Voroncovo Pole 16, kv. 1., Moskvo.

K-dino Olga Magnickaja, 2-a Kladbiŝĉenskaja, barak 13, kv. 3, Ivanovo-Voznesensk, dez. koresp. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Gemembroj de esp-grupo dez. koresp. ĉu individue, ĉu kolektive pri ĉ. temoj kĉl. L, PK, PI, gaz. ktp. Resp. garantiata. Adr.: Esp.-grupo ĉe Centr-Arĥivo RSFSR, ul. Marksa-Engelsa 20, Moskvo 19.

K-do K. Kalinin, Postnikovskaja 19, Pskov, interŝ. PM, kĉl. ĉiam resp. Bazo-Ivert-Tellier 1928.

Adresŝanĝo: K-do A. Klimov, Redakcio "Krasnoe Znamja" Tomsk (Siberio). Antaŭe: en Mariinsk, str. de Lenin 25. Gek-doj skribu!

K-do Petro Amplijev (lernanto, junkom.), Stacio Zverevo I. V. ĵ. d. dez. koresp. pri ĉ. temoj, kun ĉ. landoj, PK, PI. Resp. garantiata.

K-dino Alenjo Ĥmelnickaja (lernantino), Stacio Zverevo I. V. ĵ. d. (al Klaŭdino Ĥmelnickaja), dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. garantiata.

— Klubo je nomo "Pariza Komuno" muzika rondeto, dez. koresp. kun muzikistoj, interŝ. notojn ktp. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: A. V. Atanov, Ŝiglovski R.-K. Stalinsk. okr. Klubo Pariza Komuno.

K-do F. Ibragimov, Ŝaĥta 1, Ŝiglovski R.-K. Stalinsk. okr. dez. koresp. kun karbministoj kĉl. pri vivdemandoj, Resp. garant.

Adresŝanĝo: K-do S. Skiba, str. Krasnaja 16, lĝ. 7, Stavropol-Kaŭkazia (antaŭe Proletarskaja 14, lĝ. 9, kaj poste: str. 1-a Jelobovskaja 29).

K-do Beitelmacher (oficisto), Grupkom Sovtorgsluĵ 1, Lenin, prosp. Kremenĉug, dez. koresp. pri div. temoj kĉl., precipe pri lab. vivo k movado.

AVERTO!

Ni komunikas, precipe al holandanoj, ke depost nun K-do Bosma estas anstataŭigita kiel peranto de K-do Benjamin pro malakurateco. K-doj kiuj havas plendojn, bonvolu tion sciigi al la kontrolkomitato laŭ adreso **R. A. Dekker,** Kanaalstr. 161, III, **Amsterdam.**

K-doj!

Sendu il. gaz., PI, fotojn pri teatro, skribu pri artdirekto de loka teatro, cirkonstancoj de geaktoroj ktp. Plej trafajn informojn mi uzos por nia profunuiĝa gaz. "Aktoro". Rekompenco laŭ ĉies deziro, ĉu gaz., PI, artikoloj ktp. Adr.: **Ed. Mikelsons,** Pasta kantoris, **Riga.**

Sovetio!

Esp. ĉelo ĉe teksa fabriko dez. starigi internacian kunligon kun ĉiul. teks-laboristoj, kolektive aŭ individue. Ni ankaŭ interŝ. ĵurn., il. gaz., PI, bfl. ktp. Adr.: "Fabriko Pariza Komuno", **V.-Voloĉek,** Tversk. gub.

ENHAVO:

	pağo
Faŝismo kaj vatikano	287—88
Ribelulo amita de la laboristoj	288
Faktoj kaj komentoj	288
Hodiaŭaj ĉininoj	289
Tago el mia vivo	289
Buĝeto de medicina laboranto en Sovetio	290
Al kelkaj korespondantoj	290
Mondvojaĝo per esperanto	290
Korektoj	290
Sennaciula Sporta Paĝo	291
Tra Esperantio	292—94
Anoncoj, Korespondado	293—94

Preselo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)